



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,  
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 233

Septembro, 2005

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto  
Stevens Norvell — kompostisto  
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto  
Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson  
329 Poplar Drive  
Dartmouth, Nova Scotia  
KANADO B2W 4K8  
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:  
Reni Porter  
71 RidgeValley Road  
Halifax, Nova Scotia  
KANADO B3P 2E5

Abona kosto por Kanado estas \$8, por Usono \$12, kaj por aliaj landoj estas \$20

★ ★

## HONORIGO DE D-RO STEVENS NORVELL

Dum la 90-a UK (Universala Kongreso) de UEA (Universala Esperanto Asocio) en Vilno en julio 2005, D-ro Stevens Norvell fariĝis honora membro de UEA. Tiun grandan honoron li ŝuldas al multaj agadoj, ne nur en Kanado (kiel, ekzemple, por ĉi tiu revuo (kaj *Lumo* kaj *Inter Ni*) kaj en la halifaksa grupo), sed ankaŭ internacie (ekz. la laboro, kiun li faris por la nova eldono de *PIV*). Li certe meritas la gratulojn de ĉiuj anoj de KEA kaj mi kaptas la okazon tuj tion fari ĉi tie.

— Geoffrey Greatrex, *Lumo* (aŭgusto 2005)

## VORTO ĈE LA STRATO

La 25-an de septembro ĉi jare nia grupeto denove partoprenis transkanadan librofoiron "The Word on the Street" ĉe halifaksa Kajo 21. En kaja konstruaĵo apud la haveno kaj granda krozŝipo, la foiro - kiu festas legadon kaj verkadon - allogis centojn da halifaksanoj por aĉeti librojn, aŭskulti verkistojn, kaj informiĝi pri diversaj kleraj aferoj. Ĉe nia informtablo ni parolis kun multaj homoj, kelkaj el kiuj ankoraŭ neniam eĉ aŭdis pri Esperanto. Ili vidis diversajn librojn el la Libraro Ludovika, bildojn el Esperantujo, kaj belan montraĵon de objektoj de la japana kulturo senditaj de Chizuko NISHI en Japanio. Ni ankaŭ disdonis multajn inform-foliojn kun la espero, ke oni ekinteresiĝos pri la internacia lingvo. Ni semas kaj semas.

— la redaktoro

## BLANKKAPA AGLO KAJ BRULANTA AKVO

„Blankkapa Aglo” kaj „Brulanta Akvo” estis la du restantaj anoj de la Esperanto-Klubo ĉe la Norda Hants-a Kampara Altlernejo (Hants North Rural High School). Antaŭ kvar monatoj, ili ambaŭ abiturientiĝis. Nun ne estis Esperanto-Klubo en tiu lernejo, kaj mi devos decidi ĉu mi penos rekomenci klubon aŭtune. Pro miaj spertoj tie, mi scias, ke ne estas facile interesi la instruistojn pri la eduka valoro de Esperanto. La lernejestro permesis, ke mi starigu la Klubon antaŭ kelkaj jaroj, kaj eĉ provizis min per klasĉambro kaj iloj por montri la kursajn vidbendojn. La personaro ĉiam estis afabla sed ĉiu estis tre okupata kaj neniu montris intereson pri Esperanto aŭ la klubo. Do, tio vere ne multe kuraĝigis min.

Tamen, anstataŭ plendi, permesu al mi diri iomete pri la du abiturientuloj. „Blankkapa Aglo” (kies vera nomo estas Ilona Corbin) kaj „Brulanta Akvo” (kies vera nomo estas Christopher Henningsen) elektis tiujn „Esperantajn” nomojn kiam ili estis komencantoj. Dum la klasaj kunvenoj, ni ĉiam uzis tiujn nomojn. Ili ambaŭ estas inteligentaj kaj gajnis la plej altajn notojn de la 2005-a abiturienta dek-dua klaso de la lernejo. Brulanta Akvo gajnis la plej altajn notojn kaj Blankkapa Aglo gajnis nur kelkajn notojn malpli ol li. Kompreneble, mi ege fieris pri „miaj” du junaj Esperantistoj kaj diris tion al ili post la abiturienta ceremonio.

Brulanta Akvo aĉetis la libreton de la Pasporta Servo de TEJO kaj planas vojaĝi dum eble unu jaro uzante tiun Servon. Li volas pensi kaj plani pri sia estonteco dum la veturado. Dum la somero, Blankkapa Aglo, kiu estas kadetino en la Reĝa Kanada Aerarmeo, lernas kiel piloti aviadilon en Gander, Novlando. Ekde septembro ĝis la fino de la jaro, ŝi vizitos la Universitaton de Sankta Anne ĉe Church Point, por finlerni la francan. Poste ŝi planas vojaĝi al Eŭropo por vagi dum kelkaj monatoj uzante la Pasportan Servon de TEJO.

Laŭ mi, estas interese, ke la du plej lertaj studentoj de la 2005-a dek-dua klaso estis anoj de la Esperanto-Klubo.

— Kim Keeble

## NORDA AMERIKA SOMERA KURSO (NASK) 2005

Dum tri semajnoj en julio, 24 studentoj vivis esperante en Brattleboro, Vermont ĉe S.I.T. (School for International Training). Ellen Eddy kaj Tim Westover helpis organizi la aferon. Tim ankaŭ redaktis nian ĉiutagan novaĵleteron "La Naska Fasko". Lee Miller organizis kaj instruis la komencantan kurson; Birke Dockhorn instruis la meznivelan kurson; kaj Paŭlo Gubbins instruis la altnivelan kurson, kiu ĉi-jare temis pri la Esperanta drama arto. Bertilo Wennergren, la edzo de Birke, donis plusan lecionon pri gramatiko.

Mi estis en la altnivela kurso, malgraŭ mia ne altnivela Esperanto, ĉar tiu kurso interesis min. Mi jam studis Esperanton dum nur 20 jaroj – ne sufiĉe por regi. Bertilo emfazis, ke Zamenhof mem unue deziris klarecon; facileco estis flanka afero. Por mi, L.L. sukcesis pri la flanka afero. Paŭlo prezentis tri horojn de dram-arto drome ĉiu-matene. Li mansvingis; li laŭte kriis; lia instruado estis duona prelego kaj duona drama prezentado. Ni ĝuis. Miaj klasanoj diskutis dramajn aferojn lerte kaj interese. Ĉar miaj klasanoj estis pli lertaj kaj parolis pli flue ol mi, mi opinias, ke mi akiris multon ankaŭ el ili. Lertiĝo inklinas suben.

Humphrey Tonkin vizitis kaj prelegis unu vesperon pri la usona revolucio, la UN kaj Irako. H.T. parolis senhezite, klare kaj lerte – tre impona. Li diskutis multajn punktojn en struktura maniero, sed pri unu mi memoras speciale klare. Li diris, ke kiam personoj unue lernas lingvon kaj renkontas alian kulturon, ili opinias ke popoloj vere estas samaj tutmonde – la samaj bezonoj, la samaj amoj, timoj, revoj. Sed post tiu unua impresio, kiam ili pli profunde scias la novan socion, ili opinias ke tiuj popoloj estas tute fremdaj, eĉ strangaj - neniel similaj. Dr. Tonkin konjektis, ke eble tio okazis kiam G.W. Bush decidis fari siajn aventurojn en la mez-oriento. Li estis nur en la unua fazo de scio.

Duncan Charters vizitis kaj faris sian faman prezentadon pri etnaj akĉentoj. Dum aliaj vesperoj KINOSHITA Hisashi instruis la japanan paperfaldan arton. Bharat GHIMERE montris bildojn kaj prelegis pri sia hejmlando Nepalo. Emilija GJURCINOVSKA faris same pri Makedonujo, kaj Paŭlo pri Anglujo. Francisko Lorrain kaj Saŝi (Hisashi) instruis Goo ludon. Don Houpe montris sian ridindan mallongan DVD „D-ro Ratamanto”. La neleciona parto de la tempo estis valora; la neformalajn konversaciojn dum la manĝado, ĉe la taverno ktp ĉiuj ĝuis.

En 2006 la somera kurso estos denove en Brattleboro, sed eble poste ĝi revenos al Kalifornio por akiri pli da studantoj. Dudek kvar ne sufiĉas. Estis 50 aŭ 60 studantoj kiam la kurso estis en Kalifornio.

Mi rimarkis, ke estis multe pli da viroj ol virinoj ĉe la kursoj kiel kutime. Ĉu Esperanto estas pli alloga por viroj ol virinoj?

— Reni Porter

## MIA PENSO KAJ REMEMORO AL IU ARTIKOLO

En *Inter Ni* (n-ro 231, julio 2005) aperis la artikolo „Retletero de Ed Harler.” Legante ĝin miaj okuloj kaptis jenan frazon, „Estis nur tri redaktoroj - Harry Lewis (la fondinto), vi mem, kaj Gene Keyes, kiuj servis senpage. Tio ne estas kutima.”

Unue pri tio, ke senpaga servo ne estas kutima. En Japanio troviĝas multaj lokaj grupoj Esperantaj, kiuj eldonas organojn kelkfoje en ĉiu jaro. Ankaŭ nia grupo eldonadas organojn 3-4 foje ĉiujare jam de pli ol 20 jaroj. Plue, ĝuste 20 jarojn ni sendas (de nun sendos) al la grupanoj raportaĵon ĉiumonate por pli frue sciigi ilin pri diversaj aferoj pri nia agado kaj Esperantujo. Por fari la laboron, la grupanoj laŭviciĝas kiel redaktoro senpaga. Ankaŭ mi ofte akceptas. Tamen, ke nur unu redaktoro ĉiumonate devas eldoni organon dum longaj jaroj, tio estas tute lacega laboro. Honore dankinde!! Ankaŭ mi volas subteni kaj gusti nian ideosupon kune kun *Inter Ni*-anoj.

Due pri s-ro Harry Lewis. Ankoraŭ juna, mi jam volis vojaĝi sur la Insulo de Princo Edŭardo (PEI) Kanado, kiun mi bone sciis per la libro *Anne of Green Gables*. Tamen mi ne povis utiligi la anglan lingvon, kaj rezignis. Sed antaŭ dudek kelkaj jaroj mi feliĉe ekkonis kaj eklernis Esperanton, per kiu mi nepre vojaĝos. Post duonjaro mi finis komenclernadon. Mi planis korespondi kun PEI-ano. Responde de mia konsulto, mia gvidanto montris libreton, en kiu viciĝis nomoj de delegitoj tutmondaj. Mi trovis nomon "Harry Lewis" en ĝi. Mi ĝoje skribis leteron al li, ke li bonvolu prezenti korespondanton, kiu loĝas en PEI.

Li tuj respondis kaj prezentis f-inon Kim Keeble, kiu estas ano de *Inter Ni*, sed ne estas PEI-ano. Dank' al li, ankoraŭ nun ni estas amikoj. Mi volas sciigi al vi liajn bonkorecon kaj karakteron, eltirante parton de lia letero de la 15a de aprilo, 1981:

**Kara Amiko:**

En Princo Edŭardo insulo estas neniom! (Almenaŭ, se ekzistas iuj ili ne estas membroj de KEA.) Mi mem naskiĝis en PEI kaj loĝis tie sur farmbieno apud Charlottetown dum ĉirkaŭ 20 jaroj. Tamen mi nun estas 68-jara fraŭlo kaj eĉ ne vidis la lokon dum multaj jaroj. Vi menciis "kulturejon". Ĉu ĝardeno? Estas Esperantistino, kiu loĝas kun amikino ĉe farmbieneto kaj kultivas vegetalojn kaj florojn, kaj havas kaprojn, kokidojn, ktp. Ŝi venas de Vankuvero kaj nenion scias pri PEI. Ŝi volonte korespondos kun vi. Mi jam aŭdis, ke *Anne of Green Gables* estas populara libro en Japanujo dum jaroj. Mi legis preskaŭ ĉiujn el tiuj libroj kiam mi estis knabo kaj multe ŝatas ilin.

Sincere via H. J. LEWIS

— Chizuko NISHI